

Fajrero 1/1960

ONI KLASU NIAN AGADON ĜUSTE KAJ KONSCIE!



Ni eniris la jaron 1960, ankaŭ la jaron jubilean. Nia tuta respubliko festas la 15-an datrevenon de la liberiĝo el sub jugo de la germana faŝismo. Kompreneble ankaŭ ni devas rerigardi kaj taksi la 15 postmilitajn jarojn. Krome por la juna generacio esperantista la nuna jaro plenigas la unuan deĵaron de la celkonscia kaj signifa laboro sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio.

Antaŭ nelonge trapasinte la sojlon de la nova jaro ni ne volas oratori, sed prepari materialon por la vasta diskuto kaj respondeca analizo de la postmilita periodo. Samtempe ni devas la agadon daŭrigi. Tio signifas daŭrigi sub konsidero de la pasintaj jaroj, ĉar daŭrigi signifas eviti la mankojn faritajn. Eviti la mankojn estas pli malpli facile, sed ni starigu antaŭ nin pli altan celon, la bonan superi per la pli bona. Tiucele ni prezentas al niaj membroj kaj geamikoj ĝeneralan programan kaj metodan skizon pri komplekseco de la agado.

Esperanto kiel lingvo apartenas al neniuj nacio, al neniuj ŝtato aŭ ŝtatbloko, al neniuj klasoj, al neniuj mondkonceptoj, ĝi estas lingvo, do per si mem sole rimedo de interkompreniĝo. Laŭ sia origina destino kaj karaktero ĝi celas la interkompreniĝon inter ĉiuj nacioj. La lingvon povas uzi kiu ajn en la mondo kaj por kiu ajn celo, tio cetere konformas kun ĉiuj ceteraj lingvoj kaj ankaŭ kun la Bulonja Deklaracio.

La homoj povas tuŝi Esperanton diversmaniere. Ni iom esploru tiujn eblajn aspektojn de la rilato de homoj al Esperanto. Por la klasifiko sufiĉas starigi kvar kriteriojn:

- I.
 1. Uzo de Esperanto ekster temo interlingvistika, sed laŭ principoj de esperantismo, ekzemple en pacmovado, en scienco kaj tekniko, komerco, informado, amikaj rilatoj...
 2. Uzo de Esperanto ekster temo interlingvistika, sed kontraŭ la principoj de esperantismo, t.s. kontraŭ ĉiuspeca plibonigo de dezirataj internaciaj rilatoj.
- II.
 3. Rekta kaj intenca laboro por fortigi pozicion de la Esperanto-movado, por ĝia oficiala akcepto.
 4. Rekta kaj intenca agado kontraŭ Esperanto, aŭ lingvo internacia ĝenerale.

La klasifiko montras al ni, ke en du kazoj povas esti rilato al esperantismo negativa kaj en du kazoj pozitiva. Lingvo, kiun oni uzas en la rilatoj 3. kaj 4. ne estas decida. La esperantistoj agantaj en la senco de esperantismo, plu mi uzados nur "esperantistoj", ne respondecas pri servoj de la lingvo en aferoj kontraŭesperantismaj, en aferoj kontraŭdemokrataj kaj kontraŭsocialismaj, sed ili devas aŭ aktive aŭ pasive, sed prefere aktive montri sian starpunkton kontraŭ tia misuzo de la Lingvo Internacia.

Laŭ du kriterioj eblas rilati Esperanton pozitiva. La rilatoj estas efektivigataj per certa agado, kiu estis en lastaj jaroj diskutata en Ĉeĥoslovakio kiel agado peresperanta kaj poresperanta. Malfeliĉe diskutintoj ofte komprenis la aferon tiel, ke unuflanke estas laboro por Esperanto, duaflanke laboro per Esperanto, kaj inter ili profunda abismo. Tia ĉi apartigo de ambaŭ pozitivaj rilatoj al la Lingvo Internacia estas nepre malĝusta kaj kritikinda. La pozitivajn rilatojn ne eblas dividi. Ne eblas perbaloti, ke ekde hodiaŭ ni laboros nur per Esperanto kaj ne por Esperanto laŭ la konata "art-por-artismo", ĉar ne estas eble taksigi egale arton kaj lingvon. La unua estas klasa kaj subjektiva, la dua estas eksterklasa. Por pli firme apogi la kontinuo inter ambaŭ rilat-aspektoj mi konsideras necesa konkretan demonstiron de la problemoj:

Agado per Esperanto estas grava tasko de ĉiu esperantista organizo, ĉar estas necese elkrei la fundamenton organizan kaj literaturan, sur kiu povus konstruiĝi la lingva praktikado inter adeptoj de la Internacia Lingvo. La lingvo mem, se ĝi devas esti viva, devas esti en konstanta procedo, ĝi devas esti praktikata, kaj ne praktikata sole en teoriaj lingvistikaj traktaĵoj, sed ĉie, en ĉiuj aspektoj

de la vivo nuntempa. Nur tia milfaca fajlado kaj polurado povas garantii al la lingvo ĝian vivon kaj progreseman evoluon. Tion devas konscii ĉiu uzanto de la lingvo, ĉiu institucio.

Praktikado de la lingvo signifas agi per Esperanto. Tiaspeca agado estas hodiaŭ jam konsiderinde varia kaj signifa, sed en estonteco ĝi devas ankoraŭ multoble kreski. Ĝi estas realigado de la fundamenta principo kaj celo de ĉiu lingvo, ne nur de Esperanto. Sed ties specifa trajto estas, ke ĝi faciligas rilatojn sur la tereno internacia. Nia grava laboro "per Esperanto por la mondopaco" estas ankaŭ unu ĉenero en tiu ĉi aktivado, kiam oni ne parolas pri Esperanto, sed en Esperanto. Tamen inter la apliko kaj sorto de Esperanto estas nepra kondiĉeco, kaj tie fontas la celata kontinuo inter ambaŭ pozitivaj rilat-aspektoj. La kontinuo ni trovas ankaŭ en niaj grupoj, kiuj ne povas nur instrui, sed devas funkcii ankaŭ kiel unuaj aplikantoj, kiel kulturcentroj ĉu de ĝenerala aŭ de faka direkto. Ili nepre devas praktiki la lingvon.

Kaj nun ni turnu nian atenton al la dua pozitiva rilat-aspekto, al la pura laboro por Esperanto. En kiaj formoj ekzistas tiu ĉi agado? Resume ni povas grupigi la agadon en kvin formojn:

1. Sciencaj esploroj
2. Dokumentado
3. Organizado de la movado
4. Informado
5. Instruado.

Tiu ĉi vico de kvin formoj de poresperanta laboro prezentas kvazaŭ fabrikon je esperantistoj. Sed verŝajne nek tiu ĉi nek iu alia sistemo ebligas racie aŭtomatigi produktadon de esperantistoj, kaj tute ne sen la bazo kreata helpe de poresperanta aktivado, kiu ebligas praktike uzi la lingvon. La poresperanta agado sen la poresperanta ne havas daŭran signifon kaj renverse eblas emfazi, ke ankaŭ la poresperanta laboro sen la poresperanta ne havas ĝeneralan signifon, ĉar la nombro de adeptoj ne kreskus, mankus science bazitaj argumentaj pravigantaj nian lingvouzon, mankus la organizo, ekzistus unueco nek programa kaj fine nek la lingva. Do, la para agado poresperanta estus neefika kaj post ia tempo sekvus miasma fiasko.

Evidentiĝas, ke unusola irvojo laŭ sanaj principoj estas labori por disvastigo kaj pozicia firmigo de la Lingvo Internacia kaj pere de tiu efektivigadi labarojn de civitana ĉiutaga karaktero en skalo kaj forumo internacia. La starpunkto de kelkaj esperantistoj en nia lando, ke nia tasko estas labori sole per Esperanto por la paco, por la patrujo kaj socialismo, ne estas ĝusta. Apartigo de la menciita tasko samtempe ja venigus malfortigon de la movado kaj iom post iom ankaŭ de la apartigita direkto. Vi povas oponi, ke ni povus tiamaniere uzi Esperanton ankaŭ tiam, kiam en nia lando tute ne estus la movado esperantista, destini eldonaĵojn nur por eksterlando k.s., sed sciu, ke tio estus ekspluatado, eluzado de bona afero elkulturita de fremdaj homoj sen rekompenco, sen nia kontribuo al la tutmonda movado.

Jan Werner

ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ KAJ JAN AMOS KOMENSKÝ.

La nomo de Jan Amos Komenský /Comenius/ sonas en la tutmonda literaturo kaj lia verkaro estas respektata kaj studata inter ĉiuj kleraj nacioj. Ne estas necese klarigadi kaj akcenti la signifon de la granda filo el malgranda ĉeĥa nacio al esperantistoj, kiuj alte taksas lian laboron pri unu universala lingvo, en kiu vidis Comenius komencon de la efektivigado de siaj ideoj pri plibonigo kaj feliĉo de la tuta mondo.

La granda pedagogo kaj pacemulo Comenius, la pioniro de novaj metodoj por eduko de la popoloj, apartenas al ni, al "pacaj batalantoj", kiuj kolektiĝas "sub la sankta signo de l'espero". Estas kompreneble, ke precipe ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj, propagandas scion pri Comenius per artikoloj, broŝuroj kaj paroladoj. Tion dokumentu nomaro de niaj Esperantaj literaturaĵoj, kiuj aperis en nia kaj eksterlanda Esperanto-gazetaro.

1902 – Český esperantista /Bystřice pod Hostýnem/. Redakcio de tiu ĉi unua Esperanto-revuo por Ĉeĥoslovakoj skribas en sia enkonduka artikolo pri Comenius kaj lia konsilo, kiel krei

internacian lingvon.

- 1902 – Český esperantista /Bystřice pod Hostýnem/, J. Krumpholc: K 150. narozeninám J. Dobrovského./150—a naskiĝtago de J.Dobrovský./– Paĝoj 89-91. Rememoro je Comenius, kiu ankaŭ – samo kiel J. Dobrovský – sopiris je unu komuna lingvo por Slavoj.
- 1904 – Český esperantista /Bystřice pod Hostýnem/. J. Krumpholc: Tvorba slov v esperantu./Kreo de vortoj en Esperanto./ Pa?oj 78–80. Kreo de Esperantaj vortoj similas al ideo de Comenius.
- 1908 – Internacia Pedagogia Revuo /Bystřice pod Hostýnem/. J. Krumphole: Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala. Paĝoj 3-5.
- 1908 – Český eaperantista /Praha/. J. Krumpholc: Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala.– Paĝoj 1, 26, 57, 73, 88, 105, 120, 135.
- 1909 – Český esperantista /Praha/. Bšk.: Kiu estis Comenius? – Paĝo 77.
- 1909 – Internacia Pedagogia Revuo /Bystřice pod Hostýnem/. J. Krumpholc: J. A. Comenius pri la lingvo universala.– Paĝoj 24-27.
- 1910 – Český esperantista /Praha/. Bšk.: Kie naskiĝis Comenius?– Paĝoj 76-77.
- 1910 – Český esperantista /Praha/. Red.: Komenský v literatuře esperantské. /Comenius en Esperanta literaturo./ – Paĝoj 118-119.
- 1910 – Internacia Pedagogia Revuo /Bystřice pod Hostýnem/. J. Krumpholc: La malnova artista portreto de J. A. Comenius. – Paĝoj 33-34.
- 1910 – Internacia Pedagogia Revuo /Bystrice pod Hostýnem/. J. Krumpholc: La unua scienca eldono de ĉiuj verkoj de J. A. Comenius. - Paĝoj 113-114.
- 1911 – Časopis českých esperantistů /Praha/. D-ro S.Schulhof: J. A. Comenius.- Paĝo 49. Tiu ĉi poemo aperis en la Esperanta rubriko de la holanda gazeto "De Avondpost" en Haag.
- 1913 – Internacia Pedagogia Revuo /Antwerpen/. J. Krumpholc: Didaktiko kaj Informatorio de J. A. Comenius. - Paĝoj 76-78.
- 1913 – Časopis českých esperantistů /Praha/. D-ro O. Kádner: J. A. Komenský. – Tradukis K. Procházka. - Paĝoj 3-20.
- 1913 – Časopis českých esperantistů /Praha/. J. A. Komenský: Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro. Ĉapitro XVII-a. Profesio de soldatoj. Tradukis Kss.P. Paĝoj 65-66.
- 1914 – Časopis českých esperantistů /Praha/. J. A. Komenský-Comenius: Orbis pictus.- La mondo en bildoj.- Paĝoj 13, 41, 55, 74, 88, 100.
- 1917 – Germana Esperantisto /Dresden/. J. Šupichová: Comenius kaj Esperanto. - Paĝo 76.
- 1920 – Esperantský zpravodaj /Praha/. J. Šupichová: Komenský a idea řeči mezinárodní. /Comenius kaj la ideo de universala lingvo./ - Paĝoj 9-10.
- 1920 – La Progreso /Plzeň/. Dr Silaba: J. A. Comenius.- Paĝoj 69-70.
- 1921 – Rondeto de esperantistinoj en Praha. /Praha./ Prof. d-ro Jan Novák: J. A. Komenský. - Tradukis Rondeto de esperantistinoj en Praha.- Broŝuro, paĝoj 27. Tiu ĉi broŝuro estis disdonata al partoprenantoj de la XIII-a Universala kongreso de Esperanto en Praha.
- 1921 – La XIII-a /Praha/. J. Šupichová: J. A. Komenský.- Paĝo 17.?
- 1922 – Esperantský zpravodaj /Praha/. J. Šupichová: J. A. Komenský.- Paĝo 17.
- 1923 – Škola esperanta /Praha/. H. K. Bouška: J. A. Komenský o umělém jazyce mezinárodním ve spise "Via lucis"/Cesta světla, 1641/.- Comenius pri artefarita lingvo internacia en la verko "Via lucis", Vojo de lumo, 1641.- Paĝoj 17, 33, 65.
- 1925 – Legu kaj parolu! /Praha/. J. Šupichová: Fragmento el broŝuro de prof. d-ro Jan Novák pri Comenius.- Paĝoj 76-77.
- 1928 – La Progreso /Praha/. Komenský a my. - /Comenius kaj ni./ Paĝo 27.
- 1933 – Ligilo /Prostějov/. J. A. Komenský: Admono al Eŭropanoj. - Paĝo 68.
- 1937 – Internacia Pedagogia Revuo /Winschoten/. D. Čyževskij Nova trovaĵo de Komenský-skribaĵoj. - El la slovaka tradukis J. V. Dolinský. - Paĝoj 100–103.
- 1947 – Esperantista /Praha/. J. Hendrich: Umělý jazyk podle Komenského. /Artefarita lingvo laŭ J. A. Comenius./ Tradukis S. K. - Paĝoj 49-52.
- 1951 – Esperantista /Praha/. J. Hendrich: J. A. Komenský a mezinárodní jazyk. /Comenius kaj internacia lingvo./ Paĝo 117

- 1952 – H.K.Bouška: J. A. Komenský. Manuskripto de eldonota broŝuro.
1953 – La Progresanto /Amsterdam/. H. K. Bouška: Jan Amos Komenský.- Paĝoj 41–42.
1956 – Norda Prismo /Stockholm/. J. Šupichová: Pri Jan Amos Komenský.- Paĝo 88.
1957 – Heroldo de Esperanto /Scheveningen/. J. Grodl: Jan Amos Komenský /Comenius/. -Paĝo 1.
1957 – Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2. Dro J. Fousek: Jan Amos Komenský. Comenius kaj la internacia lingvo. – Paĝoj 1-2, Marto-Aprilo.
1957 – Norda Prismo /Stockholm/. Josef Fiendrich: Jan Amos Komenský. Tradukis Jana Cíchová.-- Paĝoj 206--209.
1958 – Internacia Pedagogia Revuo /Toulouse/. Giovanni Calo: Omaĝo al Comenius. Tradukis Jana Cíchová. – Paĝoj 1-2.

Ni estas feliĉaj, ke ni povas publikigi vortojn de la glora reforminto de lernejoj. Prave oni nomas lin prapatro de lingvo internacia, per kiu li volis disvastigi pacon inter la nacioj.

Julie Šupichová

Georgo DEŠKIN:

Vintra revo

Dum unu nokto denstavole
surfalis neĝo – blankigist'.
Infanoj glitas jam petole,
en mia koro – vintra trist'.

Feliĉaj estas afrikanoj,
al kiuj neĝo kaj glaci'
nur ŝajnas iaj aĵoj vanaj,
neklarigeblaj per raci'.

Ho, se per iu artifiko
/jen kiaj pensoj regas min/
mi transloĝiĝus al Afriko
en par' kun mia amatin'!

Dresigus tie ni panteron,
sub palmo estus nia nest',
tutjare ĝuus ni someron
sen zorgoj pri hejtaj' kaj vest'.

Sufiĉus eta ŝtofa peco
al mi kaj mia knabinet',
por kovri lokojn, kiujn deco
devigas teni en sekret'...

Por via distro, kara Evo,
per fantazio kaj imag'
kreiĝis mia "Vintra revo"
en hodiaŭa frosta tag'!

Nov. 1959, Miĉurinsk,
al L.T. – mia Evo.



EL HISTORIO DE SKIOJ.

Dum vintro miloj, centmiloj da homoj veturadas en montarojn, kaj tie ili ĝuas "la blankan sporton" - la skiadon.

La instrumento, ebliganta movon sur neĝo, estas tre malnova invento. Jam la greka historiisto Xenofon mencias en la j. 444 antaŭ nia erao, ke armenaj komercistoj uzadis "la neĝajn ŝuojn". Sed ankaŭ ili ne estis la unuaj, kiuj al si faciligis la iradon sur la neĝo. Pri tio atestas arkeologiaj trovaĵoj en groto en Norvegio, kie oni malkovris desegnaĵojn pri homoj, moviĝantaj per la neĝoŝuoj. La desegnaĵoj devenas el la tempo 800 jaroj antaŭ nia erao. Aliaj trovaĵoj gvidas nin ankoraŭ en pli malnovan tempon - en la ŝtonepokon kaj en la tempon, kiam homo unuafoje devis venki la malfacilojn de la neĝa terkovraĵo. Jam en tiu epoko homo klopodis faciligi al si la movon sur la neĝo, por povi pli facile ĉasi la bestojn.

En Bohemion venis la skioj nur en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Ĉiuflanka sportisto Rössler-Ořovský en Praha mendis en Norvegio prospektojn pri glitŝuoj. Li ricevis ilin kaj samtempe ankaŭ prospektojn pri skioj. Li mendis du parojn.

La doganistoj estis embarasitaj, kiam la strangaj iloj venis. Ořovský skribas en siaj memoraĵoj: "La sinjoroj estis senkonsilaj, neniam antaŭe ili vidis tion. La unuajn du parojn impostis laŭ la ĉionsava dogantarifo kiel boatremilojn - kiel lignan varon ordinaran, nelakitan."

Do tiel venis la unuaj skioj en nian ĉefurbon. Strangahazarde - tiu ĉi higitoria evento okazis en la sama jaro 1887, kiam en Varsovio aperis la Unua libro de Esperanto. Ni vidu, kiom da adeptoj havas la skiado kaj kiom da adeptoj havas nia lingvo! Kaj ankaŭ nun ne mankas homoj, kiuj rigardas Esperanton kiel la "imperiestraj-reĝaj" doganistoj la skiojn antaŭ 72 jaroj!

Adolf Staňura

Zdeněk Čapek

Brilo en mallumo

RAKONTO

Tra malhela, nebulplena nokto mi marŝas malfeliĉa kaj sola. Hieraŭ mi estis feliĉa kaj forta, sed hodiaŭ mi sentas nur malfeliĉon kaj malforton. Homoj aperas kaj malaperas en la densa nebulo kaj mi iras malrapide surstrate, nesciante, kial kaj kien mi iras tiel longan tempon, ĉar ĉiam mi revenadis el fabriko, kie mi laboras ĉe frezmaŝino, rekte al mia loĝejo, al mia edziro Hana. Hodiaŭ mi ne povas reveni hejmen kaj ĉirkaŭpreni mian edzineton. Hodiaŭ mi nur sencele, malrapide iras tra malvarma, matena nebulo.

Ni konatiĝis en unu malgranda urbo en la okcidenta parto de Bohemia dum dimanĉa danĉfesto. Mi ne sciis kia, sed ni komencis vivi kune kaj post du jaroj ni geedziĝis. Ni havas du gefilojn.

Neniam mi pripensis tiun aferon, ĉar ĝi ŝajnis esti logika kaj tute bona. Mi nepre bezonis iun, kiu prizorgus min kaj kiu amus min. Hana fariĝis tiu persono. Hana fariĝis mia edzino. Neniam ni parolis pri nia vivo antaŭa, mi eĉ ne demandis mian edzinon pri ŝiaj parencoj. Mi sole sciis, ke ŝi laboris kiel servistino en familio de riĉa bienposedanto. Mi sole sciis, ke ŝi amas min.

Neniam ni interkoleris dum la du jaroj de nia kunestado. La unuaj malfacilaĵoj komenciĝis kiam mi antaŭ unu monato revenis hejmen kaj ne trovis la vespermanĝon preparita. Mia edzino



havis viziton. Jam la unua rigardo, la unua impresio, diris al mi, ke la blondhara virino, kiu sidis en nia loĝejo, alportis ion malbonan kaj malsanan en nian vivon.

Kiam mi petis vespermanĝon, mia edzino diris al mi, ke ŝi ne havis tempon, ke mi prefere iru manĝi en iun restoracion. Unuafoje dum nia kunestado mi elkriis je mia edzino, unuafoje dum nia kunestado mi foriris kolekplena.

Mi revenis tiunokte tre malfrue. La vizitantino estis jam for, sed en nia loĝejo restis malplaĉaodoro de ŝia parfumo kaj en miaj oreloj ankoraŭ sonis ŝia alta, malmola voĉo.

Denove ĉio ŝajnis esti en ordo. Mi revenadis el mia laboro malfrue nokte kaj ĉiam mi trovis vespermanĝon preparita kaj brakojn kaj sinon de mia edzino malfermitaj. Ĉio ŝajnis esti en ordo.

Hieraŭ en la laboro okazis al mi malagrabla akcidento. Mi devis viziti kuraciston kaj forlasi la laboron. La manplaton mi havis bandaĝitan, doloro jam ĉesis.

Mi promenis tra vesperaj stratoj, vivaj kaj homplenaj. Mi decidiĝis eluzi la liberan tempon por viziti mian malnovan kamaradon Joĉjon, kiun mi jam du jarojn ne vidis. Mi sciis, ke li vespere vizitadas la noktamuzejon "La Blanka Rozo".

Facile mi trovis la amuzejon kaj eniris. Komence mi vidis nenion krom cigareda fumo kaj svarmo de homaj korpoj. Post momento io allogis mian atenton, iu konata persono tie dancis. Mi venis pli proksimen kaj ne povis ekkredi al miaj okuloj. Mia propra edzino dancis tie kun iu fremda homo, kiu ŝin kisadis kaj agis kiel ŝia amanto.

Mi memoras, ke mi terure elkriis, ke mi interrompis la dancadon kaj unuafoje en mia vivo batis virinon, unuafoje dum nia kunestado mi bategis mian edzinon Hana. Ĉio daŭris nur kelke da sekundoj, ĉar mi tuj malsuprenkuris, en la straton. Tie mi ekstaris apogante min kontraŭ dommuro, senkonscia kaj senvorta.

Mia amiko Joĉjo, kiu vidis la tutan scenon, venis al mi kaj diris: "Mi pensis, ke vi scias ĉion pri la vivo de Hana. Ŝi ja laboris tie kiel kelnerino kaj entute ne estis tuŝtima." Joĉjo diris, ke li supozis, ke mi scias ĉion, kaj foriris. La tutan nokton mi sencele promenis. La tutan nokton mi ĉion pripensadis. Estas jam mateno kaj miaj paŝoj direktiĝas al la domo, kie estas mia loĝejo. Senvole mi iras al mia loĝejo, en nia fenestro mi vidas lumon. Mi iras malfeliĉa kaj malforta, nesciante, ĉu mi atingos la brilantan lumon, kiu sin turnas al mi en la matena mallumo.



Ĉervená n/Vlt. 19.7.1959. D-kursa skriba ekzameno. La formo estis fiksita, temo libera, limtempo: 2 horoj.

esperanto - nia spegulo

KUNVENO DE ESPERANTO-RONDETO ĉe O.B. en STONAVA, distrikto KARVINÁ, okazos dimanĉe la 27-an de marto 1960 en LABORISTA DOMO. - La programo:

9.00 Publikaj paroladoj, la ĉeflingva kaj pollingva, pri Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio kaj en la mondo.

Diskuto.

Kultura enmetaĵo.

12.00 Tagmanĝo en la Laborista Domo.

13.30 Laborkunveno de esperantistoj.

La ĉefa temo: B - k u r s o j de Esp. Komunikio: fervojlinio Bohumír-Žilina, stacio STONAVA, de tie 20 min. da piediro.

JAPANA PRELEGISTO EN ĈSR. La japana esperantisto Eizo Ito, direktoro de "Oomoto" en Kameoka, dum sia prelegvojaĝo ĉirkaŭ la mondon haltis en Praha kaj prelegis 14.II. je la temo "Japanujo antikva kaj lastatempa". La esperantlingva parolado estis akompanata per koloraj lumbildoj. Lia privojaĝa rakontado 13.II. estis magnetofone surbendigita.

16.II. E. Ito prezentis la paroladon en la Esp. Klubo en Brno kaj 19.II. en Opava.

Esp. rondeto en Opava organizis du publikajn prelegojn de E. Ito, unu por gepioniroj de la Pionir-domo, unu por publiko de la urba. La paroladoj estis tre sukcesaj kaj ĉirkaŭ 300 ĉeestantojn bone informis ankaŭ pri la Esperanto-movado. Interpretis J.Solnický kaj V. Kočvara.

S-ano Eizo Ito el Opava veturas rekte al Hungario, Jugoslavio, tra la suda Eŭropo al Francio, Anglio, Usono, Kanado kaj en julio 1960 al Japanio.

EKSPOZICION "MONATO DE ESPERANTA LIBRO" aranĝis en la tagoj 10.12.1959 – 10.1.1960 la Esperanto-Rondo de Kleriga Domo kaj la estraro de Publika Biblioteko en Třebíč. La ekspozicio vekis ĉe multnombraj vizitantoj de la biblioteko vivan intereson.

VIVSIGNO EL BŘECLAV. Malgraŭ tio, ke en Břeclav ankoraŭ ne estis renovigita Esp. rondeto, estas tie kelkaj samideanoj kaj okaze de la Zamenhof-jubileo s-ano A.Vája ekspoziciis en la elmontra ŝranko en la ĉefplaco kelkajn Esperantajn librojn, gazetojn kaj korespondaĵojn sub la devizo: Esperanto – la dua lingvo por ĉiu kaj unu por ĉiuj.

DENOVE NI RAPORTAS PRI NOVAJ ESP. RONDETOJ!

DVŮR KRÁLOVÉ n/Labem. Iniciate de la instruisto B.Štefek estis fondita nova E-rondeto ĉe la Domo de Klerigo en Dvůr Králové n/Labem. La 10-membran rondeton gvidas s-ano Josef Pácalt. Nuntempe jam proksimiĝas al la fino la elementa kurso kun 25 komencantoj. Instruas s-o B.Štefek.

TEPLICE. Nova E-rondeta fondiĝis ĉe Uzina Klubo de la entrepreno je nomo de Bož. Němcová en Teplice Lázně v Čechách la 6-an de dec.1959. Ekde la 15-a de jan.1960 okazas tie la elementa kurso gvidata de Zd.Rusín laŭ la lernolibro de T.Kilian per rekta metodo. Post la 6-a leciono vizitas la kurson regule 40 komencantoj, 85 % estas gejunuloj .

KOLÍN. Membroj de la rondeto en Poděbrady, laborantaj en Tatra Kolín, fondis tie uzinan rondeton kaj kurson, kiu ekiras ĝojige.

KELKAJ NOVAĴOJ EL LA ESPERANTISTA RONDETO DE LA DOMO DE KULTURO EN PODĚBRADY. 10 komencantoj atingis jam la 14-an lecionon /rap.15.2./, konversacia kurso estas en kadro de la regulaj kunvenoj. La rondeto organizas ankaŭ skribajn kursojn A- kaj B-gradajn, kunlaboras kun la grupoj en Velký Osek kaj Dymokury. - Al Esperanto--Asocio en Germana Federacia Respubliko la rondeto sendis proteston kontraŭ jud-malamikaj incidentoj en GFR.

ESPERANTO EN LA GAZETARO.

"Praga" /Bratislava 7.10.1959/. - Treba vytvorit' novu reč? - La red. respondas al unu leganto. "Aufbau und Frieden" /Praha 9.1.1960/. Artikolo de B.Guttman "Doktor Esperanto".

LA MOVADO eksterlande

"SET" EN HUNGARIO. La Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro planas aranĝi somertendaron ĉe la belega lago Balaton kun partopreno de najbarlandaj esperantistoj, precipe gejunuloj.

HUNGARAJ ĴURNALISTOJ INTERESIĜAS PRI ESP-O.

En la Ĵurnalista Societo en Budapeŝto estis laŭ ties oficiala programo kunveno por kelkaj ĵurnalistoj. Aranĝe de la Budapeŝta Teritoria Esperanto-Komitato invititaj esperantistoj laŭvice klarigis la celon, staton, progreson de la Esperanto-movado kaj respondis al demandoj. Menciinda estas la grava alparolo de k-dino B.Szerémi, kiu rakontis pri siaj multdekjaraj laborist-movadaj spertoj kaj komparis sian nunan dekjaran lernadon de la rusa lingvo kun la iama sesmonata lernado de Esperanto, post kiu si jam gvidis kurson por laboristoj. Ŝi konkludis, ke apud la graveco de la rusa kaj de aliaj lingvoj por la laboristaro, precipe por junularo, estus tre grava kaj utila la lernado de Esperanto. Tiu kunligis ilin rekte kun plej diverslandaj laboristaj kamaradoj, samfakanaj ktp. kaj kiel, aliaj parolantoj menciis -- faciligus la studon de la naciaj lingvoj. Pro tio oni instruis ĝin ĉefe en uzinoj, sindikatoj kaj en junlaoristaj rondoj. - Pri la ĵurnalista kunveno raportis kelkaj ĵurnaloj.

P.B.

BULGARA ŜTATA ELDONEJO en 1960 aperigos en Esperanto poemkolekton de la konata bulgara poeto kaj revoluciulo Nikolaj Jonkov VAPCAROV, mortigita de la bulgaraj monarkofaŝistoj.

GVATEMALA ESPERANTISTA JUNULARO fondiĝis post multaj artikoloj en ĵurnaloj, informoj en radio-elsendoj k.a. kiel sekcio de Gvatemala Esperantista Asocio. Prezidanto de GEJ fariĝis Telma Melgar, 22 calle, n-ro 36-71, zona 51 Guatemala-Ciudad, Gvatemalo.

Ni diskutas pri la informado

Drahomír Kočvara: FONDU PUBLICISTAJN RONDETOJN !

Nia publicista laboro en la tagaj kaj uzinaj gazetoj estas tute nesufiĉa. Ni nepre devas tiun laboron organizi. Mi proponas fondi en ĉiu klubo 3-membran publicistan kolektivon, kiu zorgos nur pri tiu tasko. Ankaŭ el fremdlandaj gazetoj kaj leteroj la kolektivo tradukadu por nacilingva gazetaro diversajn interesaĵojn. Nia plurlingva kontakto kun eksterlando kaŭzas, ke ni ofte nesufiĉe taksas gravecon de diversaj informoj kaj verkoj kaj preskaŭ ne peras ilin al nialanda publiko. Kelkfoje ordinara afero por ni estas por neinformita publiko sensacia fakto, kaj ni tion tute ne rimarkas. Se ni tamen iam sentas, ke tiu aŭ alia afero estas publikigenda, ni ne trovas tempon por serĉi kontakton kun redakcio, kvankam en lasta tempo multaj gazetoj afable akceptas aktualizaĵojn. Ne forgesu, ke tio estas ne nur propagando, sed ankaŭ kromlaboro per Esperanto, kiu estas dezirata kaj helpas al venko de nia movado.

Kiu incitos la iniciaton de ostravanoj? Kiu informos nin unua pri fondo de publicista rondeto kaj pri ĝia agado? Red.

NOVA GRANDA KONKURSO DE FAJRERO 1960

Lingvaj konkursoj en nia bulteno havas jam sian tradicion. Ĝin komencis Tagiĝo, la unua centra junular-bulteno en Ĉeĥoslovakio kaj en la pasinta jaro transprenis ĝin nia FAJRERO.

La konkurso donas al ĉiu eblon riĉigi siajn gramatikajn sciojn, torni sian esprimkapablon kaj kulturi sian stilon Esperantan. Signifo de la konkurso evidentiĝas precipe por la izoluloj, ĉar ankoraŭ ne ĉie estas E. kluboj, kiuj povus al ĝiaj membroj garantii kondiĉojn de la plua lingvo-kresko. Sed krom tio ne ĉiuj kluboj okazigas kursojn por progresintoj en Esperanto.

Frekventintoj de la elementaj kursoj bezonas plian lingvan edukon. Kaj tiun povas al ili doni nia konkurso, en kiu ili povas traduki kaj verki kaj kompari siajn rezultojn kun la modeloj.

Ni aperigados du paralelajn seriojn de konkurstaskoj. La unua serio estos dediĉita al la esperantistoj- komencantoj en Ĉeĥoslovakio. Ĝi enhavos precipe tradukajn taskojn kaj tre facilajn rakont-provojn.

La dua-serio estos dediĉita al la progresintoj en Esperanto, ĝin povos partopreni kiu ajn esperantisto en kiu ajn lando de la mondo. La dua serio alportas konkursajn taskojn sole en Esperanto. Ili ampleksos liberajn rakontojn, naturpriskribojn, felietonojn, aplikon de la faka Esperanto, solvojn de gramatikaj problemoj. Specialajn taskojn ni enkondukos laŭ deziroj de konkursantoj.

La konkurson vi povas partopreni kaj kiel privatulo kaj kiel membro de la konkursanta grupo. Tamea ĉiu partoprenanto estos taksata aparte.

La esperantistaj grupoj en Ostrava kaj Ústí nad Labem alvokas la ceterajn grupojn, ankaŭ eksterlandajn, ke ili provu siajn fortojn. En la intergrupa konkurso ni taksos precipe nombron kaj kvaliton de konkursantoj! La instruistoj atentigu pri la konkurso siajn gelernantojn?!

S-ano Solnický el Opava rimarkigas al la pasintjara konkurso: "Multaj solvas la konkursajn taskojn, sed ili ne havas kuraĝon sendi ilin al vi!"

Tio estas superflua modesteco! Se vi sendos al ni viajn kontribuaĵojn, via ĝojo estos pli granda - des pli granda, ĉar vi povos ricevi iun el la preparitaj premioj.

Por ni via partopreno estos signo, ke nia laboro ne estas vana, ke nia multnombra legantaro komprenas kaj subtenas nian klopodon.

Via amasa partopreno en la konkurso pruvu do denove vivkapablon de nia movado! Ni venku pesimismen de la skeptikuloj! En la jubilea jaro de la ĉeĥoslavaka E. junularo antaŭen al la novaj sukcesoj!

La redakcio preparas por venkintoj de ambaŭ konkursaj serioj 14 valorajn Esperantajn librojn. Po unu libro ricevos venkintoj en taskoj de ĉiu unuopa numero. Tri venkintoj de ambaŭ serioj ricevos krom libro ankoraŭ honoran diplomon pri la partopreno kaj Premion en la konkurso.

Novaj taskoj estos publikigataj en la Fajrero n-ro 1-a, 2-a, kaj 4-a. De la 2-a numero ni laŭeble ĉiam publikigos 5 plej bonajn konkursintojn en ĉiu serio kun indiko de nombro de akiritaj poentoj. Krome ni publikigos nomojn de ĉiuj aliĝintaj grupoj kaj nombron de partoprenantaj membroj. La fina venko dependas de sumo de poentoj akiritaj en ĉiuj kvar serioj.

Kontribuajoj de la enlandaj samideanoj estu forsenditaj plej malfrue unu monaton post apero de la koncerna numero de Fajrero. Kontribuajoj de la eksterlandaj gesamideanoj - precipe el malproksimaj landoj - estos konsiderataj sendepende de la alvendo.

Ĉiujn konkursajn kontribuajojn kaj novajn proponojn sendadu al la konkursgvidanto: Vlastimil Novobilský, prom. chem. Slavíkova 346, Ústí nad Labem.

Kaj nun ek al la laboro!

LA UNUA SERIO

I-a kategorio.

Tasko 1-a: přeložte do esperanta:

Kdysi žil muž, jenž bydlel v domě, ve kterém se nacházel skřítek. Skřítek byl zlomyslný a všemožně trýznil ubohého muže. Konečně se muž rozhodl, že se odstěhuje; potom ať si skřítek zůstane ve starém domě. Všechno už bylo odstěhováno, zbýval jen poslední nákladní vůz s velikým sudem nahoře. Pojednou uviděl muž na sudu červenou čepici. V témž okamžiku se objevil skřítek a zlomyslně pravil:

"Nu! Dnes se tedy stěhujeme!"

Tasko 2-a: popište v esperantu jeden den na horách v zimě.

Tasko 3-a: Ioni uplynulo 100 let od narození Dr. L. L. Zamenhofa. Proč UNESCO zařadilo dr. Zamenhofa mezi osobnosti, které lidstvo na celém světě vděčně vzpomíná?
/Vypracujte česky./

II-a kategorio.

Tasko 1-a: elektu unu el la temoj:

a/ La kultura mondo rememoras la 22-an de februaro 1960 la 150-an datrevenon de la naskiĝo de la fama pola muzik-komponisto Frederyk Chopin. Rememoru tiun ĉi majstran de tonoj per rememor-portreto. /Formo estas libera./

b/ La 27-an de majo 1960 pasos 50 jaroj de la morto de granda sciencisto ROBERT KOCH, kiu donis al la homaro eblon kontraŭbatali kaj venki tuberkulozon. Skribu pri la signifo de tiu ĉi homo por ni ĉiuj. /Formo estas libera./

Tasko 2-a:

En la artikolo "Ĉu vi konas bone Esperanton?", kiun preparis s-ano J. Kořínek, trovu ĉiujn gramatikajn erarojn kaj stilajn malĝustaĵojn kaj korektu ilin!

Tasko 3-a: Trovu tradukintojn kaj aŭtorojn de la menciitaj Esperantaj libroj: Hamleto, Faraono, Sinjoro Tadeo, Streĉita kordo, Floroj de malbono.

Diskonigu la konkurson inter viaj amikoj!

La kategorion elektu respondece laŭ viaj scioj lingvaj!

Ĉu vi konas bone Esperanton

/KOREKTU LA ERAROJN !/

Per tio, ke vi trovos la erarojn kaj mem ilin korektigos, vi montros, ke vi konas bone uzi la internacian lingvon. Multo dependas de tio, se vi scipovas logike pensi. Ja ies leteroj ofte estas plenaj da eraroj. Klopodu korespondi kaj skribi, sed verku ĝis kiam vi estros la lingvon. Eble vi plendos, ke vi havas mankon da tempo. Sed finigu tiajn elturniĝojn! Vere, tio validas por ĉiun. Restas al ni tamen eta ono da ĉiu tago por nia perfekteĝo. Se oni volas, oni ĉesas sian hezitemon. Se vi estos persista en via laboro, vi havas la taskon duone faritan. Neniam pensu, ke vi ne bezonas studi pli. - Hardito ne timas malvarmumiĝon. Rilate tiu afero, lasu al vi konsili. Kiam mi venis al mia amiko, li estis ĵus rigardanta el la fenestro. Mi lasis al mi la mantelon alikolorigi. Atentu bone la transitivecon de la verboj! Ne perdu nek horon el via vivo. Ĉu vi bone konas principon da sufiĉo kaj neceso? Ĉiuj foriris, kaj mi restis mem en la ĉambrego. Anoncitaj estas Ing. Kafka kun sia edzino. Kafka kaj sia edzino estas de ĉiuj ŝatataj. Tiu urbdomo estis konstruata en la deksepa jarcento, precize en la jaro 1671. Distinga eco de Esperanta reflexive estas, ke ĝi anstatuigas aŭ rilatas la subjekton de la plej proksime esprimita ago en frazoj aŭ prepozicioj kun pluraj verboj. Se vi volas perfekte regi Esperanton, konu la gramatikan karakteron de la radikoj kaj studu la regulojn pri vortfarado en la Plena gramatiko de Kalocsay-Waringhien. Unu ĉevalo helpas pli ol unu homo en

tiu vilaĝo, kie ĉevaloj tiel raras. Oni devis disdoni ĉirkaŭ sama kvanta al ĉiuj soldatoj. Oni donacis al la infanoj po unu pomo. Oni sendis po unu karton al ĉiuj skribintoj. Mi timas, por ke vi ne malfruiĝu. Li deziras, por ke vi baldaŭ venu. Mi aĉetis al mi hieraŭ novan krajonon kaj plumon. Li altelefonis min ol iri dormi. Ĝuste antaŭ momento ili ambaŭ foriris. JK

Recenzo

ADRESO:

"A DIÓSGYORI KOZPONTI KOHÁZATI MÚZEUM"

KÓZGONTI KOHÁSZATI MÚZEUM MISKOLC-DIÓSGYÓR, MAGYARORSZÁG

Centra Metalurgia Muzeo en Hungario instalita en Miskolc, en la fino kun resumo en Esperanto. La legantoj estas invitataj al la muzeo, kiu respegulas metalurgion ne nur hungaran, sed de diversaj popoloj kaj epokoj.

Tasko de B-kurso estas plene "digesti" gramatikon, precipe tiujn punktojn, en kiuj oni plej multe eraras kaj kiujn oni plej multe bezonas por ordinara ĉiutaga parolo. Plue plivastigi vortprovizon tiom, ke la frekventintoj post finiĝo de la kurso scipovu flue paroli Esperante pri ordinaraj aferoj.

Nia B-kurso en Fajrero ne estos kompleta lernolibro por tiu kurso. Ĝi alportos nur kelkajn ekskursojn, kiujn vi povas uzi en viaj B-kursoj en la rondeto. Josef Cink

EXZERCO la: Urĉete, je-li slůvko "co" a "to" v následujících větách v prvním nebo ve čtvrtém pádu.

Co děláš? Co je to? Co máš? Co nevíš? Má, co chtěl. Co je nového? Co budeš dělat večer? Co je tam? Co jsi tam viděla? Co neví, neřekne. Co je k večeři? Co je lepší? Co budeme zpívat? Co chcete? Nevím, co chtěl. Ví, co je tam.

To bude dobré. To nemohu vědět. Viděl jsi to? To nechci. To je velmi zajímavé. To už mám. To nevdí. To už jsem slyšel. Nech to! Napiš to! Už jsi to slyšel? To vím také. To je v pořádku. To udělám já. Přeložte to do esperanta.

EKZ. 2a: Přeložte slůvka "co" a "to" z předešlého cvičení.

EKZ. 3a: Naučte se plynne a bez dlouhého rozmýšlení překládat věty z cv. 1.

EKZ. 4a: Utvořte česky a hned esperantsky rozkazovací způsob od těchto sloves /vzor: čti, čtete = legu.../:

sednouti si (sidiĝi), vejíti (eniri), psáti (skribi), přeložit (traduki), zavřít (fermi), otevřít okno (malfermi fenestron), poslati (sendi), sdělití mně (sciigi al mi), půjčiti (pruntedoni), dát (doni), chvíli počkat (atendi momenton, předati (transdoni), podepsati (subsribi).

EKZ. 5a: Utvořte k slovesům a předešlého cvičení zdořilý rozkazovací způsob pomocí slůvka "bonvolu", česky i esperantsky (vzor: sedněte si, prosím - bonvolu sidiĝi ...).

EKZ. 6a: Napište překlad vět z cv. 1.

EKZ. 7a: Napište obyčejný a zdvořilý imperativ (rozkaz. způsob) ke slovesům z cv. 4.

EKZ. 8a: Vypište si a naučte se z následujících slovíček všechna, která neznáte:

etaĝo, teretaĝo, kelo, tegmento, subtegmento, ŝtuparo, balustrado, koridoro, antaŭĉambro, loĝejo, kuirejo, loĝoĉambro, dormoĉambro, lavoĉambro, necesejo, anso, ŝlosilo, seruro, plafono, planko, muro, akvokondukilo, lavujo, kontaktilo, ampolo, vesthoko, ŝranko, tirkesto, seĝo, lito, kuseno, kapkuseno, kovrilo, meblo, forno, centra hejtado.

EKZ. 9a: Odpovězte na následující otázky! Každou otázku můžete rozvést na další.

Kie vi loĝas? En vilaĝo, en urbo? Ĉu la domo apartenas al vi? Ĉu ĝi estas granda? Kiom da etaĝoj ĝi havas? En kiu etaĝo vi loĝas? Kio estas sub teretaĝo? Kion oni havas en kelo? Kion oni havas en subtegmento? Kian koloron havas tegmento de via domo? El kio konsistas loĝejo? En kioĉambro loĝejo vi loĝas? Kie oni dormas, kie oni kuiras? El kio konsistas ŝtuparo? Kian

funkcion havas balustrdo? Per kio oni malfermas pordon? Kial oni ŝlosas la pordon? Kiaj mebloj estas en loĝejo? Ĉe kio estas tirkestoj? Sur kio oni kroĉas vestaĵojn? Per kio ni (lumigas) prilumas la ĉambron? Per kio ni estingas la lumon? Kie ni dormas? Per kio vi kovras vin? Ĉu vi havas oentran hejtadon? Kial oni hejttas?

EKZ. 10a: Přečtete nahlas následující povídku:

PATRO, FILO KAJ AZENO. Sur strato iris patro kaj filo. Ili kondukis azenon. Homoj miris : "Kial ili iras piede, se povas sidiĝi sur azenon, ili estas stultaj." La patro do sidiĝis sur la azenon kaj ili iris plu. Homoj insultis la patron: "La patro sin portas kaj lasas malfortan knabon iri piede. "Do sidiĝis la filo sur la azenon kaj la patro iris plede. Denove tio ne plaĉis al la homoj: "Juna filo lasas sian maljunan patron iri piede. Ambaŭ jam ne sciis kion fari, ke tio plaĉu al la homoj. Do ili kunligis piedojn de la azeno kaj mem portis ĝin.

EKZ. 11a: Přeložte povídku z cv.10 a zároveň si vypište všechna neznámá slovíčka! Potom plynně přeložte povídku ještě jednou.

EKZ. 12a: Vypravujte povídku z cv.10.

EKZ. 13a: Pisemně přeložte následující věty (dom. cvičení):

Proč jsi nu to nedal včas? Řekni jí o tom! Nás to vůbec nezajímá, řekni jim to. Viděl jsem ho naposled před rokem. Mně nikdo o ton neřekl. Zdravil jsem tě, ale nevšiml sis mne. Nám tu nic nechybí. Přiveď je sem. To ti není nic platné. Přinesu vám ji až zítra.

EKZ. 14a: Napište (aspoň 10 vět) o krásách a zajímavostech vašeho města nebo vesnice /domáci cvičení/. Daŭrigota..

ANONCETOJ

ALVOKO AL MUZIKEMULOJ. "Amika Servo" – Tutmonda Koresponda kaj Kolektanta Klubo de Esperantistoj kaj Esperanto-amikoj ĉe grava ilustrita pollingva semajnaĵo "KULISY" alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj sin okupas pri muziko, aniĝi al "Amika Servo".

Muziksekcio "La Verda Liro" havas membrojn en 26 landoj. Ĝi celas krei per ESPERANTO INTERNACIAN KONTAKTON INTER MUZIKEMULOJ kaj KULTURI per la DIVERSSPECIAJ MUZIKELDONAĴOJ, SPEKTAKLOJ, EKSPozICIOJ ktp. AMIKECON INTER la ESPERANTISTARO de ĈIUJ LANDOJ.

"La Verda Liro" celas organizi esperantistan muzikservon en ĉiuj kontinentoj, formi muzikkvertetojn, triojn, muzikkonkursojn kun premioj ktp.

"La Verda Liro" petas komponistojn, aŭtorojn de tekstoj, gekantistojn, muzikpedagogojn kaj muzikamatorojn, kiuj volas iamaniere helpi realigi ĝiajn projektojn, sendu tuj vian adreson, muzikkontribuaĵojn po 3 ekz. je adreso: Mag. fil. Mieĉislav ZGÓRZEWSKI, literatura publicisto, WROCLAW 2, skrytka pocztowa 22, POLLANDO.

Interesuloj ricevas detalojn en formo de informletoj. Jam eldonitaj fotokartoj kun komponaĵoj estas liverataj kontraŭ 2 int. resp.kup.eŭ egalvaloraj esperantaĵoj.

NASKIĜOJ. Al 1a geedzoj Bobĉikovi naskiĝis filo Miroslav. Gratulas esperantistoj el Horní Němčí apud Uh. Brod.

La 12-an de februaro naskiĝis al la geedzoj Křivánek filo Radko. Sincere gratulas E.rondeto en Písek.

KORESPONDI DEZIRAS. Gekantistoj de la Varsovia Operejo deziras interŝanĝi ariojn kaj kanzonojn en Esperanto. La leterojn oni sendu al la kursgvidanto: Andreo Pettyn, MILANÓWEK, k/W-wy, ul. Kósciuszki 24, Pollando.

Esperanto-rondo de la vitrouzino "Tarbeklaas" dez. kor. kun vitrolaboristoj el la tuta mondo. Skribu al Esperanto-rondo de TARBEKLAAS, Marati 12, TALLIN, Estona SSR.

25-j. instruisto kun ĉ. 1. pri vivo kaj amuzo de infanoj kaj junularo k.a. Deziras gajni abonojn de fremdland. E. gazetoj kontraŭ abono de Fajrero, p.m. k.s. Adr. Jan Tichý, instr. BÍLÁ VODA II., apud Zábřeh na Moravě, Ĉeĥoslovakio.

URĜE NI BEZONAS POR PLUAJ NUMEROJ DE "FAJRERO" OFSET-PAPERON NUR EN FORMATO "A2". Proponu al nia administrejo!

HAHAHAHAHAHAHAHA

LASTA PROVO DE LA
PREZIDANTO INTERESIGI
KLUBANOJN

- Diru, kara panjo, kial falas pluvo?
- Por ke la tero malsekiĝu kaj la arboj povu kreski.
- Sed kial ĝi falas ankaŭ sur la asfalton?
(Hungara Fervoĵista Mondo)



Konduktoro kaj vojaĝanto:

- Vian biletan mi petas!
- Mi ne havas.
- Kaj kien vi veturas?
- Mi ne scias.
- Diable, kial vi do eniris?
- Ĉar vi tiam kriis "envagoniĝu!"

ŜI: Hodiaŭ vi tute malatentas min!

LI: Vi ja ne pravas.

ŜI: Ho jes. Vi eĉ ne demandas min pri mia farto!

LI: Nu, mia kara, kiel vi fartas hodiaŭ?

ŜI: Eĉ ne demandu!

Vojaĝanta komercisto demandis junan sinjorinon, ĉu la edzo estas hejme.

"Ne estas", ŝi respondis. Li forvojaĝis deĵore je tri semajnoj."

"Tio ne gravas, mi atendos," diris li.

SET TELEGRAMO: LANĈOV APUD VRANOV 4/D411
I-a ETAPO: 17. VII. - 30. VII. 1960 [KURSOJ: B, C, D]
II-a ETAPO: 31. VII. - 13. VIII. 1960 [KURSOJ: A, B, C].

**FAJRERO estas bulteno de junaj esperantistoj en
Ostrava-regiono, Ĉeĥoslovakio. Aperas laŭbezene.**

FEBRUARO 1960. N-ro 1 /7/.

ELDONAS: ZK ROH Třineckých železáren VŘSR.

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Ing. Jan Werner /responda/.

RED. ADRESO: Fajrero, OSTRAVA 15, Na Laohu 6, Ĉeĥoslov.

ADMINISTREJO: Vl. Kočvara, OSTRAVA VIII, Kamence 3.

ILUSTRIS: Ing. ark. Miroslav Kalný.

p. k. n-ro T404012/0